

Heinrich Heine,  
Fraŭlino ĉe la maro staris

*tradukita de Kálmán Kalocsay*

Fraŭlino ĉe la maro staris  
kaj ĝemis kun sopiro,  
kortuŝon tiel grandan faris  
al ŝi la sunsubiro.

Fraŭlin', gajĝu senbedaŭre,  
vin olda scen' katenas:  
la sun' foriras ĉi-antaŭe,  
postdorse ĝi revenas.

*Traduko de la Germana poemo "Das Fräulein stand am Meere" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaloĉajo, \*1911 - †1976).*

*Arg-471-1078 (2010-05-22 11:49:29)*

Heinrich Heine,  
Dum sun-subiro staris

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Dum sun-subiro staris  
Ĉe l' maro la fraŭlin'.  
Suspirojn longajn faris,  
Kortuŝis tio ŝin.

„Ĉu vi pri tio miras?  
Malnovas tio ĉi!  
Ĉi tie ĝi subiras,  
Deposte revenas ĝi.“

*Traduko de la Germana poemo "Das Fräulein stand am Meere" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1985-05.04.*

*MR-184-1 / Arg-471-909 (2008-05-12 17:22:43)*